



**Litovio sen
flugiloj**

**La papo
pardonpetas**


**Ortodoksaj preĝejoj
en la ĥarkiva regiono**

MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...



Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Paĝoj: 624; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 33

ISBN: 978-90-77066-39-3

Prezo ĉe FEL: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte
de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Yahoo! akuzita



10

La juĝejo de Dendermonde en Belgio kondamnis la usonan Interret-giganton Yahoo!. La retperanto estis akuzita pro la rifuzo kunlabori kun jura enketo. La firmao ricevis unufojan punon de 55 000 eŭroj kaj ricevos ĉiutage plian punon de 10 000 eŭroj, se ĝi plu rifuzas kunlabori. Yahoo! jam informis, ke ĝi ne akceptas la kondamnon, kaj pluŝovos la kazon al arbitracia tribunalo.

Peniko kaj propagando

11



La pentraĵo temas pri kunveno de reprezentantoj de 81 komunistaj partioj dum novembro 1960. Tiam Nikita Ĥruŝĉov kaj lia grupo intencis ekskludi la komunistan partion de Ĉinio el la internacia komunisma movado pro kontraŭdiro inter la du tiamaj plej grandaj komunistaj partioj.

Litovio sen flugiloj

12



En la vespero de la 16a de januaro 2009 la flugo de la litova flugkompanio flyLAL – Lithuanian Airlines el Amsterdamo al Vilniuso, prokrastita je unu horo, estis la lasta en la historio de la kompanio. Poste la agado de la kompanio, fondita en la jaro 1938, estis haltigita. Ne plu estas rektaj flugoj el Vilniuso al Budapeŝto, Madrido, Londono, Amsterdamo, Frankfurt, Milano, Kievo kaj Moskvo. Oni informas, ke la ŝuldoj de la kompanio superas 26 milionojn da eŭroj.

FOTO DE LA KORBILO: STUCKIN CUSTOMS

politiko

NOV-ZELANDO	8
Ĉefministro „ki”via	
IRLANDO	9
Unulitera diferenco ...	

moderna vivo

KINARTO	10
Filmoj el socialisma erao	
JURO	10
Yahoo! akuzita	
PENTRARTO	11
Peniko kaj propagando	

ekonomio

LITOVIO	12
Litovio sen flugiloj	

spirita vivo

La papo pardonpetas	13
JUDISMO	14
Nova sinagogo en Speyer	
Kompreno en kunteksto ...	16

turismo

UKRAINIO	18
Ortodoksaj preĝejoj en la ĥarkiva regiono	

novelo

ANALOJ DE BAILENAMBEANN	20
Kronikoj pri la vivo en irlanda urbeto:	
Proksimaj kaj malproksimaj najbaroj	

libroj

Jen vera granda vortaro	24
-------------------------------	----

enigmo

Bilda enigmo	26
--------------------	----

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj.....	6
› El mia vidpunkto.....	7
› Anoncetoj.....	27

► Rekto al la eldonejo ...

> Per via FEL-konto.
 > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
 > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen.
 > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
 > El Usono per ordinara usona ĉeko.
 > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validadon fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
 > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
 > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
 > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.
 Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	24	27	14,4	5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	24	27	14,4	5	9
Britio	GBP	39	42	23,4	4	7
Bulgario	EUR	26	29	15,6	5	9
Ĉeĥio	EUR	34	37	20,4	5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	40	70
Estonio	EUR	26	29	15,6	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	46	50	27,6	5	9
Grekio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hispanio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hungario	HUF	6950	7750	4170	1340	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	42	45	25,2	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1460
Kanado	CAD	76	80	45,6	9	15
Kipro	EUR	34	37	20,4	5	9
Koreio	EUR	42	45	25,2	5	9
Kostariko	EUR	24	27	14,4	5	9
Kroatio	EUR	26	29	15,6	5	9
Latvio	EUR	26	29	15,6	5	9
Litovio	EUR	26	29	15,6	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	34	37	20,4	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	398	430	238,8	45	73
Nov-Zelando	NZD	105	110	63	11	19
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalia	EUR	42	45	25,2	5	9
Rusio	EUR	24	27	14,4	5	9
Serbio	EUR	25	29	15	5	9
Slovakio	EUR	26	29	15,6	5	9
Slovenio	EUR	34	37	20,4	5	9
Sud-Afriko	EUR	42	45	25,2	5	9
Svedio	SEK	466	499	279,6	49	86
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Usono	USD	78	82	46,8	8	14
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

> **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
 > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
 > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
 > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
 > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
 > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
 > **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
 > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
 > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
 > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
 > **Germanaj:**
 > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
 > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoftware@gmail.com.
 > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
 > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
 > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
 > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
 > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
 > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr.
 > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecības 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
 > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k. 187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
 > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: esper_lu@geocities.com.
 > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
 > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
 > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
 > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
 > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
 > **Ruslandaj:**
 > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalininograd, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 > Mikaelo Ĉertilov, PF. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu.
 > **Slovenaj:**
 > Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
 > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: beckford@telkomsa.net.
 > **Svedaj:**
 > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Aktuala

Nia magazino havas unu gravan malavantaĝon: ĝi ne estas vere aktuala, almenaŭ ne tiom kiom ĵurnalo, radio aŭ televido. Ĵurnalo informas pri ĉio, kio okazis dum la antaŭa tago ĝis vespero, tiel ke la postan matenon mi povas legi pri aktualaj eventoj kaj evoluoj. Sed en nia magazino inter verkado de artikolo kaj ties legado fare de vi pasas minimume kvar semajnoj, kutime eĉ pli. Tio fojfoje kaŭzas problemojn, kiel montras mia artikolo „Bruna marĉo” en la februara numero. Enkonduke mi menciis atencon kontraŭ la poliestro de bavara urbo Passau, kiun oni atribuis al novnazio. En sia letero aperinta en la martha numero Michael Lennartz atentigis pri dubindaĵoj kaj neklaraj ligitaĵoj al tiu atenco kaj konkludis: „Do krom la eldiro de la poliestro ne ekzistas iu

ajn certiga pruvo, ke okazis atenco en la raportita maniero.”

Mi verkis mian artikolojn tuj post la atenco; tiam la detaloj menciitaj de Lennartz ne estis konataj. Li verkis sian leteron kelkajn semajnojn poste, kiam oni sciis multe pli pri la evento. Se mi sciis ĉi ĉion jam kiam mi skribis pri tiu afero, mi certe prezentus ĝin alimaniere. Ni do vidas, ke estas iom riske skribi pri tre aktualaj eventoj en nia magazino. En la menciita ekzemplo tio ja ne malpravigas la temon de la artikolo mem – kreskanta novnaziismo en Eŭropo –, sed ĝi donas iom strangan impreson, kvazaŭ mi asertus ion neveran. La aktualeco de nia magazino estas „relativa”; tio signifas, ke temo ja povas esti aktuala, sed ke ni ne povas raportari pri io ĵus okazinta, se ni ne estas absolute certaj pri la fakto. Sed en la menciita kazo ŝajnis kredinda kaj

fidinda (ne nur por mi) ĉio, kion asertis la poliestro. Do en tiu momento, nur kelkajn tagojn poste, mi ne povis dubi.

Cetere ankaŭ nun, pli ol du monatojn poste, oni ne scias pli multe. La esplorojn intertempe gvidas supera polica instanco, sed ankaŭ ties speciala komisiono ĝis nun trovis neniun „varmegan spuron”, kiel tion nomas la polica ĵargono. La afero do restas enigmo, kvankam la polico intertempe klare neas, ke la krimo povus havi motivon en la familia sfero. Se oni ne trovas atencinton, do por ĉiam restos nur la aserto de la poliestro mem. Tamen povas esti, ke jam morgaŭ en la ĵurnalo mi povos legi tute novajn detalojn ... Tiujn al vi mi povos komuniki plej frue post unu monato.

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 30a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukaĵoj); represoj kaj tradukaĵoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono.
Telefono/faksilo (216) 297-0370.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprajinitate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Nova Esperanto-muzeo

En MONATO (2009/2, p. 22) aperis interesa artikolo de Petro Chrdle pri la nova Esperanto-muzeo en la urbo Svitavy. Sur la foto estas videbla busto de L. L. Zamenhof. Al tio mi volas aldoni, ke la buston faris la skulptisto Emanuel Kodet (1880-1955) por la 13a UK okazinta en Prago en 1921. La kongreson partoprenis ankaŭ Klara Zamenhof, la vidvino de la kreinto de la lingvo, laŭ kiu la busto fidele reprezentas la vizaĝon de ŝia edzo. En la mondo troviĝas multaj statuoj kaj monumentoj de Zamenhof. Pri ili eblas ekscii, kiu kaj kiam prizorgis ilin, kiu financis ilin ktp, sed nur malofte oni povas ekscii la nomon de la skulptisto.

Jiří PATERA
Ĉeĥio

Ĉu komposteraro?

En la enkonduko de la februara numero Stefan Maul skribis: „En malgrandaj trinkejoj kaj en grandaj festotendoj oni denove rajtas fumadi laŭplaĉe.” Mi supozas, ke forfalis

parto, kaj ke la kompleta frazo estis: „En malgrandaj trinkejoj kaj en grandaj festotendoj oni denove rajtas fumadi kaj ĝenadi la aliajn ĉeestantojn laŭplaĉe”, ĉu ne?

Danuta PONIAŬSKI
Usono

Nova Esperanto-muzeo (2)

En mian artikolon Nova Esperanto-muzeo (MONATO 2009/2, p. 22) enŝteliĝis dum la redaktora mallongigo de mia origina teksto du malĝustigoj, kiujn mi volus iom prilumi, kvankam koncize tio ne facilas.

1. La artikolo komenciĝas per vortoj „En la urbo Svitavy (okcidenta Moravio)”, kio kaj ĝustas, kaj ne, kio ofte okazadas ĉe surlimaj urboj. La redaktoro verŝajne konkludis tion de mia pli posta mencio, ke tie ekzistis la plej granda germanlingva biblioteko en Moravio. Tio ĝustis en la konsiderata tempo. Sed nun Svitavy administrate apartenas al la bohemia regiono Pardubice, do nun ĝi estas konsiderata orient-bohemia urbo. Tial kelkaj (precipe maljunaj citavanoj konsideras sin

ĝis nun moravianoj, dum la plimulto sentas sin bohemianoj (aŭ la junaj pri-fajfas tion, konsiderante sin ĉeĥoj). Por prilumi la esprimojn por tiuj, kiuj ne konas la historion de Ĉeĥio: ĝi konsistas el tri historiaj partoj: Bohemio (okcidente), Moravio (oriente) kaj parto de historia Silezio (nord-oriente). Tamen multe pli granda parto de historia Silezio nun apartenas al Pollando.

2. Estas menciite, ke la biblioteko de Jaroslav Šustr (5800 volumoj), kiu estis ĝis nun en la muzeo en Česká Třebová, nun troviĝas en la Esperanto-muzeo en Svitavy. Sed ne estas tiel. Ĝi plu troviĝas en la urba muzeo en Česká Třebová, kien ĝin transdonis Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kiam ĝi perdis siajn ejojn en Prago. Sed laŭbezone kelkaj ekzempleroj estas pruntedonataj al la Esperanto-muzeo ekspoziciele kaj en Svitavy troviĝas jam alia biblioteko, apartenanta al ĈEA, kiun oni daŭre plivastigas (plejparte danke al donacoj, ĉar por aĉetado mankas al ĈEA financoj).

Petro CHRDLE
Ĉeĥio

Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandano. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagy.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Helpu Afganion!

de Stefan MAUL

Sep jarojn post la invado de Afganio Usono kaj NATO (Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo) sendas pliajn soldatojn al la turmentata lando. Ŝajnas, ke la aliancoj ankoraŭ ne komprenas aŭ ne volas kompreni, ke okupaciaj trupoj (solaj) ne kapablos solvi la problemojn de la lando. Jam multajn miliardojn kostis tiu „misio“, sed kun kia rezulto? Afganio, laŭ konata afgana ĵurnalisto, hodiaŭ estas displita lando regata de du fundamentistaj kaj kontraŭdemokratiaj grupoj. Unu grupon subtenas la internacia socio, la alian ĝi kontraŭbatalas. La malamikoj de la (okcidenta) alianco, taliboj kaj aliaj ribeluloj, intertempe elkreskis al regiona potenco ambaŭflanke de la afgana-pakistana limo. Ili fincas sin per kultivado de papavoj kaj vendado de opio, povante tiamaniere daŭre aĉeti modernajn iranajn, rusajn aŭ ĉinajn armilojn, per kiuj ili militas kontraŭ NATO kaj ĝiaj aliancoj.

Eraroj, eraroj

Kaj la okcidento kaj Afganio mem faris multajn erarojn. La internacia socio ne komprenis la komplikan situacion en la lando. Ni memoru, kial oni antaŭ sep jaroj invadis ĝin: por persekuti Osama Bin Laden, kiun Usono kulpigis pro la barbara atenco kontraŭ la ĝemelaj turoj en Novjorko, kaj por forpeli el la lando teroristajn talibojn. La frenezan barbulon ĝis hodiaŭ oni ne kaptis, sed tio jam ne gravas, ĉar li iĝis signifa figuro: lia terorista organizaĵo Alkaido ne plu dependas de li, sed agadas fare de multaj pli-malpli memstaraj grupoj en multaj landoj. La talibojn komence oni sukcesis repeli,



Plej grave estus, ke NATO prezentu tempoplanon por retiriĝi el Afganio.

sed iom post iom ili refortiĝis precipe en la sudo, tiel ke poste la okupaciaj trupoj pli kaj pli kruele bombardis tiun landoparton. Ju pli da civiluloj iĝas viktimoj de tiuj atakoj, des pli la taliboj gajnas subtenon en la popolo. Jen nur kelkaj bone dokumentitaj ekzemploj el la pasinta jaro: per usona atako en julio 2008 mortis 47 gastoj de nuptofesto; en aŭgusto dum funebra ceremonio pli ol 90 homoj; en novembro denove eksterlandaj soldatoj mortigis 43 homojn dum nuptofesto. Ĉu estas mirige, ke per tiaj masakroj la taliboj denove estas fortigitaj kaj subtenataj de la popolo?

Korupta registaro

Kaj la afgana registaro sub prezidanto Hamid Karzai? Ĝi ne kapablas vere regadi, ĉar preskaŭ ĉiuj ministroj estas koruptaj. Tuj kiam alvenis helpmono, ili enkasigis ĝin por si mem kaj siaj familianoj, ja ne sciante, kiom longe ili restos en siaj oficoj. El la miliardoj, kiujn ni (jes, vi kaj mi, per nia impostmono) pagis al Afganio por rekonstruado, preskaŭ nenio alvenis ĉe la homoj en la vilaĝoj. En la registaro troviĝas precipe islamaj fundamentistoj kaj „militĉefoj“, kiel en la politika ĵargono oni nomas la estrojn de milicoj kaj trupoj. Tiu registaro, laŭ la menciita ĵurnalisto, fariĝis „politika-religia aristokratio, en kiu militkrimuloj diktas la regulojn, koruptaj burokratoj kaj mulaoj, kiuj agadas simile aŭ same kiel taliboj“.

NATO nun ja komprenis, ke militagoj solaj ne povas solvi la proble-

mojn, sed ke oni devas plifortigi civilan rekonstruadon, doni lernejojn anstataŭ bombojn. Tamen, estas klare, ke ĝi ne simple povas retiri ĉiujn soldatojn, sed necesas antaŭe plifortigi la afganajn sekurfortojn. Afgana soldato gajnas 200 dolarojn monate, talibo ĝis 400 dolarojn, germana soldato en Afganio krom la salajrojn ricevas ĉ. 4000 dolarojn aldone por deĵorado eksterlanda! Afganaj armeanoj devus ricevi almenaŭ multe pli ol taliboj, se vere oni volas havi taŭgan nacian armeon. Nur forta propra armeo havas ŝancon venki la talibajn militistojn, kiuj ne plu povus propagandi, ke eksterlandaj soldatoj pravigas sanktan militon. Necesas ankaŭ paroli kun la moderaj taliboj por atingi balthalton kaj fine eble pacon. Kaj necesas fortaj afganaj trupoj, kiuj povos detrui la papavo-agrojn. Oni devas rekonstrui la ekonomion tiel, ke homoj havas laboron en siaj hejmlokoj kaj povas nutri siajn familiojn. Tio estus vera helpo por Afganio.

Retiriĝu!

Plej grave estus, ke NATO prezentu tempoplanon por retiriĝi el Afganio. Ĝi devas indiki daton, je kiu ĝi definitive forlasos la turmentatan landon. Tio donus al la homoj certecon, ke finiĝos la okupacio. Kaj ili ne plu kredos la propagandon de taliboj. Sen tia plano probable la milito en Afganio ne nur daŭros, sed povus etendiĝi al la tuta regiono inkluzive de Pakistano. Tio estus fiaska malvenko de la internacia socio. ■

Ĉefministro „ki”via

Enoficiĝis nova ĉefministro en Nov-Zelando post tutlandaj balotoj en novembro 2008. Venkis la Nacia Partio, estrata de John Key [ĝon ki], nun la plej multnombra partio en la nov-zelanda parlamento. Demisiis la antaŭa ĉefministro, Helen Clark [klak], kies Laborista Partio perdis subtenon.

Ĉiuj partioj en la antaŭa registaro (Laborista, Nov-Zelando Unue, Estonteco Unuiĝinta, kaj Progresema) ricevis malpli da voĉoj en la baloto (vidu la tabelon). Nov-Zelando Unue gajnis neniu parlamentajn seĝojn kaj ĝia estro, Winston Peters [ŭinstn pitrz], multjara parlamentano kaj iama vicĉefministro, perdis sian mandaton. La aliaj partioj ricevis pli (Nacia, AKI, Maoria kaj Verdula).

partio	mandatoj 2005	mandatoj 2008
Nacia	48	58
Laborista	50	43
Verdula	6	9
AKI	2	5
Maoria	4	5
Progresema	1	1
Estonteco Unuiĝinta	3	1
NZ Unue	7	0
Sumo	121	122

En la monatoj antaŭ la baloto, Peters estis viktimo de akuzoj, ke en antaŭaj balotoj li kontraŭleĝe ne deklaris mondonacojn al sia partio. AKI (precipe ĝia estro Rodney Hyde [rodni hajd]) kaj la

Nacia Partio akuzadis lin, sed tri oficialaj enketoj, inkluzive de unu polica, decidis, ke li faris nenion kontraŭleĝan. Supozeble la suspektita malbonfaro kostis voĉojn al la Partio Nov-Zelando Unue.

Nov-Zelando havas proporcian elektosistemon similan al tiu de Germanio. Konkursis 19 partioj en la balotado. Multaj ricevis nur bagatelajn kvantojn da voĉoj. Du kvazaŭ unupersonaj partioj restas en la parlamento: Estonteco Unuiĝinta kaj Progresema. Neniu partio ricevis pli ol 50 % de la mandatoj, do necesas interpartia kunlaboro.

Kondiĉoj

Tuj post la balotoj John Key (centra-dekstrema) interparolis kun la estroj de la partioj AKI (dekstrema), Maoria (eble centrema) kaj Estonteco Unuiĝinta (centrema). Ili konsentis kunlabori laŭ diversaj kondiĉoj. Ekzemple, ili provizos respektive du, du kaj unu ministrojn ekster la kabineto. La rapideco de la decidoj montras, ke Key lernis de antaŭaj registaroj pri postbalota marĉandado. Surpapere la registaro havas 69 mandatojn kontraŭ 53 en la opozicio.

Komentistoj diskutis kialojn por la ŝanĝo de populareco de la diversaj partioj. Helen Clark estis ĉefministro dum naŭ jaroj kaj, laŭ iuj komentistoj, ŝi estis unu el la plej bonaj kaj efikaj ĉefministroj iam ajn en Nov-Zelando. Iuj opinias, ke la popolo enuis; aliaj, ke ĝi ĝeniĝis, ĉefe pro leĝoŝanĝo por ne plu permesi al gepatroj uzi „pravigeblan perforton” por puni siajn infanojn, kion kontraŭis interalie reakciemaj eklezioj.

Pragmata

Alia faktoro estis, ke la Nacia Partio anstataŭis sian antaŭan estron Donald

Brash [breŝ]. Li estis pli dekstrema kaj puŝis en tiun direkton sian partion. Key ŝajnas pli pragmata kaj promesis redukti enspezimpostojn. Cetere li akceptis gravajn ŝanĝojn, kiujn faris la antaŭa registaro: ekzemple, kreo de ŝparsistemo Kiwisaver, nova banko Kiwibank, kaj naciigo de la fervojoj Kiwirail. La registaro reaĉetis la fervojojn en 2008, ĉar la posedanto Toll Holdings neglektis la sistemon. Sekve necesis grandaj investoj.

Kiam la finaj rezultoj de la balotado estis anoncitaj, Helen Clark demisiis kiel ĉefo de la Laborista Partio. La sekvan tagon demisiis ankaŭ la vicedestro Michael Cullen [majkl kalin]. Post kelkaj tagoj la parlamentanoj de la Laborista Partio elektis novan estron, Phil Goff [fil gof], kaj vicedestron, Annette King [anet king]. La estonteco de la partio NZ Unue estas necerta.

La monda financa situacio, kiu kolapsigis bankojn kaj aliajn kompaniojn, precipe en Usono kaj en Eŭropo, estas granda nekonata faktoro, kiun la nova registaro devos pritrakti. Interese estas tio, kion la nova registaro provos por mildigi la efikon de internaciaj problemoj.

D. E. ROGERS



**Kontribuojn pri la politiko
de via lando sendu
al politiko@monato.net.**

Unulitera diferenco ...

Manifestaciis proksimume 125 000 homoj tra la ĉefstratoj de la irlanda ĉefurbo Dublino. Ili protestis kontraŭ la politiko de la registaro rilate la nunan ekonomian situacion, kaj kontraŭ bankestroj kaj spekulantoj, kiujn ili kredas kulpaj pri la krizo.

Reprezentiĝis ĉe la manifestacio preskaŭ ĉiuj metioj, profesioj kaj sindikatoj en la lando. Partoprenis laboristoj, kiuj perdis, aŭ riskas perdi, siajn postenojn pro la problemoj de gravaj industrioj, kiel la Dell-komputila aŭ la Waterford-kristala. Ĉeestis lernejoj, fajrobrigadanoj, ŝtataj funkciuloj, purigistoj ... ankaŭ policianoj kaj armeanoj, kvankam membroj de sekurecaj kaj defendaj servoj ne kutimas partopreni politikajn manifestaciojn.

Konservativa kaj katolika

Vidiĝis ankaŭ pli aĝaj anoj de la komunisma partio, portantaj ruĝajn flagojn kun la simbolo de martelo kaj serpo, malgraŭ tio, ke en tiu ĉi tradicie konservativa kaj katolika lando ekstremaj partioj neniam fortis. Samtempe, aliaj portis afiŝojn kun devizoj „Rompu la ligon kun kapitalismo”, „For la registaro”, „Punu la bankestrojn”, „Pliŝarĝu riĉulojn, ne laboristojn”.

Ne nur en tiu ĉi okazo, sed ankaŭ ĉe antaŭaj amasaj manifestacioj protestis pensiuloj, studentoj, senlaboruloj, fleĝistoj kaj instruistoj. Inter ĉiuj klasoj kaj grupoj evidentis kolero kaj timo. Tamen, ĝis nun, neniu el tiuj, kiuj miliardope prifraŭdis la nacion, estas akuzita aŭ punita. Tial la antaŭe populara koalicia



La afiŝo tekstas: „Donu al ni pensiojn por kiuj ni pagis.”

registaro pli kaj pli perdas la apogon kaj simpation de voĉdonintoj.

Iom troige komentis kelkaj ĵurnalistoj, ke nun la sola diferenco inter Irlando kaj la bankrota Islando konsistas el unu litero.

Garvan MAKAI



Manifestaciis proksimume 125 000 homoj tra la ĉefstratoj de la irlanda ĉefurbo Dublino.

Filmoj el socialisma erao

Kvankam malgranda lando, kun malevoluinta ekonomio, Albanio produktis post 1970 jare ĉirkaŭ 14 filmojn. Laŭdire, samepoke, produktis Aŭstrio jare apenaŭ kvin filmojn.

Eblis filmproduktado en Albanio pro forta financa subteno de la ŝtato, kiu konsideris filmojn tre efikaj propagandiloj. Ekzemple, filmo pri revolucia kontraŭnaziismo, *Subigi la morton* de la reĝisoro Piro Milkani, farita en 1967, estis spektata enlande de ĉirkaŭ miliono da homoj, kaj de cent milionoj en Ĉinio. Tie oni kopiis kaj enĉinigis preskaŭ ĉiujn filmojn el la socialisma erao de Albanio.

Gitaro

Aparte tiam, dum la kultura revolucio en Ĉinio, la „ruĝaj gvardiistoj” kontraŭis ĉion okcidentan, prosperan kaj homaman, inkluzive filmojn; albanajn filmojn (ankaŭ rumanajn kaj jugoslaviajn), ne. Notinde estas, ke la gitaro, kiel ĉiuj aliaj „okcidentaj” muzikiloj, estis same abomeninda; sed ĉar en „Subigi la morton” unu el la komunistoj gitarludis, oni faris escepton. Rezulte milionoj da ĉinoj ekokupiĝis pri la instrumento.

Kvin jarojn post la apero de *Subigi la morton* la filmo estis malpermesata

en Albanio. La ĉefrolulino, Edi Luarasi, estis la edzino de la reĝisoro Mihal Luarasi, arestita kaj kondamnita dum sovaĝa kampanjo kontraŭ intelektuloj. La filmo mem tamen plucirkuladis kaj cirkuladas en DVD-formo ankoraŭ en Ĉinio kun aliaj albanaj filmoj.

Post 1990 la ŝtato ne tiom forte subtenas la filmindustrion. Malpliigis la nombro de novaj filmoj, sed la kvalito pliboniĝis. Ili nun digne konkuras en internaciaj festivaloj kun filmoj el eksterlando.

Bardhyl SELIMI

Yahoo! akuzita



La juĝejo de Dendermonde en Belgio kondamnis la usonan Interret-giganton *Yahoo!*. La retperanto estis akuzita pro la rifuzo kunlabori kun jura enketo. La firmao ricevis unufojan punon de 55 000 eŭroj kaj ricevos ĉiutage plian punon de 10 000 eŭroj, se ĝi plu rifuzas kunlabori. *Yahoo!* jam informis, ke ĝi ne akceptas la kondamnon, kaj pluŝovos la kazon al arbitracia tribunalo.

La policaj instancoj de Dendermonde estis trovintaj la spurojn de Interret-krimuloj, kiuj uzis adresojn de *Yahoo!* por ekscii financajn donitaĵojn de komputiluzantoj kaj tiel malplenigi iliajn bankkontojn. La polico petis de *Yahoo!* la

IP-numerojn, ligitaj al tiuj adresoj, por povi loki la krimulojn. La firmao tamen respondis, ke ĝi estas usona firmao kaj pro tio havas neniun devigon al eksterlanda polico.

Donitaĵoj

Belga juristo kaj prokuroro Jan Kerkhofs opinias, ke *Yahoo!* liveras servojn al personoj en Belgio, kaj do ja respondecas. „En similaj okazoj *Google* kaj *Microsoft* tuj liveris la necesajn donitaĵojn,” aldonis Kerkhofs.

Sebastian Vos de *Finsbury International Policy and Regulatory Advisers (FIPRA)* „miris” pri la akuzo. „*Yahoo!*

havas sian internan regularon,” li diris, „kaj laŭ ĝi informoj pri la uzo de eksterlandaj uzantoj povas esti transdonitaj nur al la usona polico.”

La kazo memorigas pri la jaro 2004, kiam la ĵurnalisto Shī Tāo estis arestita en Ĉinio „danke al” informoj de *Yahoo!*. Tiam proparolanto de la retperanto bedaŭris, ke „uzantoj de ĝia retservo en Ĉinio estis enkarcerigitaj, ĉar ili dissendis siajn politikajn ideojn tra Interreto”, sed argumentis, ke *Yahoo!*, same kiel ĉiuj aliaj eksterlandaj firmaoj en Ĉinio, devas obei la lokajn leĝojn.

Ĉu du diversaj mezuriloj?

pp

Peniko kaj propagando

Dum preskaŭ duonjarcento de komunismo ankaŭ la pentrarto en Albanio estis ilo de la partio-ŝtato por „eduki la popolamasojn”. Pentristoj suferis konstantan cenzuron kaj premon en sia krea laboro. Jen unu el multaj ekzemploj: la granda pentraĵo, titolita *La moskva kunveno*, de Guri Madhi (1921-1988).

La pentraĵo temas pri kunveno de reprezentantoj de 81 komunistaj partioj dum novembro 1960. Tiam Nikita Ĥruŝĉov kaj lia grupo intencis ekskludi la komunistan partion de Ĉinio el la internacia komunisma movado pro kontraŭdiroj inter la du tiamaj plej grandaj komunistaj partioj.

En tiu kunveno Enver Hoxha [hoĝa], la ĉefo de la albanaj komunistoj, defendis la ĉinajn „kamaradojn” kontraŭ la „reviziisma linio” de Ĥruŝĉov, kio signifis disiĝon inter Sovetio kaj Albanio. Tiun „gloran” eventon la politburoo de la albana komunistaj partio decidis speguli ankaŭ per pentrarto, okaze de la granda ekspozicio en 1974. Tiucele Madhi estis komisiita krei pentraĵon.

Cenzuristo

La pentristo faris sian plejebulon, sed la cenzuristo intervenis paŝon post paŝo. Kiam la verko estis preta, la komunistaj gvidantoj proponis al Madhi refari la portreton de la komunistaj ĉefo, por ke tiu aperu pli realisme, dum la aliajn figurojn de la „reviziistoj”, inkluzive de Ĥruŝĉov, kaj la ceteraj membroj de la albana kaj ĉina delegacioj oni konsentis senŝanĝe lasi. Madhi rifuzis.

Tiam oni komisiis al alia pentristo, Zef Shoshi [ŝoŝi], fari la ŝanĝojn. La pentraĵo, je dimensioj 210 cm x 265 cm, aperis kun ŝanĝoj en la ekspozicio kaj estis laŭdata kiel ĉefverko de „socialisma



Pentraĵo pri historie grava evento estis plurfoje modifita conforme al ŝanĝantaj politikaj cirkonstancoj.

realismo”. Enver Hoxha staras surpiede, kun montrofingro direktita kontraŭ la reviziistoj kaj defendante marksismo-leninismen. Ĉe-brake videblas Mehmet Shehu kaj Ramiz Alia, liaj intimaj kamaradoj, kaj apude la ĉina delegacio.

Tamen en 1978 rompiĝis la interrilatoj inter Albanio kaj Ĉinio. Tial la gvidantoj ordonis, ke oni intervenu denove en la bildo, ĉi-foje por forviŝi la figurojn de la ĉina delegacio. Madhi estis devigita fari tion: dolorige, ĉar pentraĵo similas al propra infano. Rezulte, vizitantoj en la albana Galerio de Artoj ne plu vidis ĉinojn apud la albana delegacio.

En 1981 mortigis sin Mehmet Shehu, la dua plej grava komunisto de la albana partio kaj la tiama ĉefministro, kiu en la pentraĵo staris ĉe-brake de Enver Hoxha. Tuj la partio kondamnis la sinmortigon

kaj deklaris Shehu „malamikoj, agentoj de imperiismo kaj socialimperiismo”.

Pro tio li ne plu indus aperi en la pentraĵo. Ĉi-foje Madhi denove rifuzis ŝanĝi sian pentraĵon, ĉar, laŭ li, sen tiu figuro la pentraĵo ne plu havus sencon artan. Pro tio la gvidantoj decidis eligi la pentraĵon el la Galerio de Artoj kaj konservi ĝin en arĥivo.

Denove ekspoziciata

Post 1990 la pentraĵo estis ekspoziciata en diversaj landoj (ekzemple Italio kaj Hispanio). Tie ĝi vekis grandan intereson, ne tiom pro sia arta valoro, sed pro historiaj kaj informaj aspektoj. Similan sorton dividas aliaj verkoj kaj ikonoj de la „socialisma realismo”.

Bardhyl SELIMI

Litovio senflugiloj

En la vespero de la 16a de januaro 2009 la flugo de la litova flugkompanio *flyLAL* – *Lithuanian Airlines* el Amsterdamo al Vilnius, prokrastita je unu horo, estis la lasta en la historio de la kompanio. Poste la agado de la kompanio, fondita en la jaro 1938, estis haltigita. Ne plu estas rektaj flugoj el Vilnius al Budapeŝto, Madrido, Londono, Amsterdamo, Frankfurto, Milano, Kievo kaj Moskvo. Oni informas, ke la ŝuldoj de la kompanio superas 26 milionojn da eŭroj.



Kial *flyLAL*, privatigita en la jaro 2005, alfrontis pezan financon situacion, kiu kondukis al ĝia morto? Vytautas Kaikaris, la ĝenerala direktoro de la kompanio, klarigis: „La litova flugkompanio longan tempon konkuradis en la merkato je malsamaj kondiĉoj. La falon kaŭzis plikostiĝo de aviada benzino kaj la monda financa krizo. Krome notindas, ke la posedataj aviadiloj ne respondis al la novaj merkataj kondiĉoj. Ili fariĝis tro grandaj, kaj

tial flugoj kaŭzis troajn elspezojn. Ni projektis diversajn solvojn por eskapi el la malfacila situacio. Tamen ni ne sukcesis trovi investantojn por plua aktivado kaj, ne dezirante pligrandigi la ŝuldojn, ni devas ĉesigi la agadon.”

En decembro la posedantoj de *flyLAL* turnis sin al la ministrejo pri transporto kun la propono, ke la ŝtato akiru 51 % de la akcioj de la kompanio kontraŭ nur unu lido. Tamen la registaro rifuzis. Tuj post la malsukcesa propono aperis ebla

investanto, la svisa kompanio *SCH* – *Swiss Capital Holdings*. Ĝi deklaris sin preta aĉeti la flugkompanion. La kontrakto valoris unu milionon da usonaj dolaroj kaj samgrandan kvanton da eŭroj por pagi la ŝuldojn de *flyLAL*. Tamen la aĉetonto, kiu nur en 2008 registriĝis en Svislando kaj antaŭe agadis en aliaj landoj, montriĝis neserioza. Ĝi ne plenumis sian promeson ĝiri la interkonsentitan sumon antaŭ la fiksita dato.

La decido pri la ĉesigo de la agado de la ununura litova flugkompanio konfuzis milojn da vojaĝantoj, kiuj jam havis biletojn. Post la kolapso de la flugkompanio ankaŭ la litova prezidento estis devigita serĉi novan transportanton. Krome la decido lasis la ĉi-jaran eŭropan ĉefurbon de kulturo sen rekta ligo kun pluraj aliaj ĉefurboj de la kontinento. Ĉi-momente ne klaras, kiel la situacio evoluos. Eligijus Masiulis, la ministro pri transporto de Litovio, menciis, ke juraj instancoj probable ekanalizos, ĉu la bankroto de la kompanio sen konkreta posedaĵo ne estis intencita. Ja antaŭ tiu funebra dato ĉiuj dekkelkaj aviadiloj de *flyLAL* flugis sub la administrado de la najbara kompanio *flyLAL Charters*, kiu zorgas pri mendoflugoj.



flyLAL ne plu flugas, sed ĉu por ĉiam?

LAST

La papo pardonpetas

La 12an de februaro papo Benedikto la 16a havis konversacion kun la membroj de la Konferenco de Prezidantoj de la plej elstaraj usonaj hebreaj organizaĵoj en la vatikana Konsistoria Salono. La papo pardonpetis per jenaj vortoj: „Kiel faris Vojtyla, mi pardonpetas”.

Tiu ĉi deklaro jam estis atendata post la neado de la ŝoaho¹ fare de Richard Williamson, episkopo de la frataro Sankta Pio la 10a. Antaŭ nelonge Williamson estis denove reakceptita en la katolika komunumo per la ĉesigo de la ekskomuniko pri kvar episkopoj de la frataro Sankta Pio la 10a, kiuj estis ordinitaj sen konsento de la papo. Neante la ŝoahon aŭ forinterpretante ĝiajn faktojn ĝis preskaŭa nuligo, tiu episkopo kreis grandan embarason, krom surprizon kaj suferon, ĉe papo Benedikto la 16a; kelkaj eĉ suspektis ke li senplie estus tolerema aŭ senvole komplica kun tiaj opinioj, kaj ofte oni postulis novan kaj plej eksplicitan kondamnon pri tiu neado aŭ minimumigo de la ŝoaho.

La papa pardonpeto rilatas certe ne al lia persona konduto, sed al la konduto de tiu episkopo, kiu intertempe jam estas senigita de sia eduka gvidado de pastra seminario, kaj tute ĝenerale al la konduto de

La papo pardonpetis per jenaj vortoj: „Kiel faris Vojtyla, mi pardonpetas”.

la tuta kristanaro (kaj homaro) kontraŭ la hebreoj.

La papo memorigis siajn multfojaĵajn kondamnojn, inkluzive de tiu solena dum sia vizito al la aŭŝvica ekstermejo, kaj senhezite transprenis la preĝvortojn de papo Vojtyla okaze de sia vizito ĉe la Muro de l' Ploro: „... ni estas dolorplena, ho Dio, pro la konduto de tiuj, kiuj laŭire tra la historio suferigis tiujn ĉi viajn filojn, kaj al vi pardonpetante, ni volas engaĝiĝi en vera frateco kun la popolo de la Interligo”. Kaj li aldonis siaflanke: „La malamo kaj malŝato manifestitaj en la ŝoaho estis krimoj kontraŭ Dio kaj kontraŭ la tuta homaro ... Kompreneblas, ke kiun ajn provon nei aŭ minimumigi tiun teruran krimon oni ne toleru kaj ne akceptu ... La ŝoaho estu admono kontraŭ forgeso kaj obskurigo ...”.

La kontenta konsento de la ĉeesta, aŭ malĉeesta, rabenaro komentiĝis la postajn tagojn per la deklaro de Avner Shalev, prezidanto de Yad Vashem, la muzeo dediĉita al la ŝoahaj viktimoj: „Temas pri mesaĝo ege grava por la tuta mondo”.

Armando ZECCHIN

Hebredevena esprimo, kiu signifas *neniigo* kaj kiu indikas la amasan murdaron de, interalie, judoj fare de la nazioj dum la dua mondmilito.



AMMAR ABD RABBO

Nova sinagogo en Speyer

La 9an de novembro 2008 en Speyer [ŝpajer], suda Germanio, la urbo kaj la juda komunumo kune fondis novan sinagagon. En la lastaj jardekoj multaj judoj el Rusio translokiĝis en tiun apudrejn urbon. Tial la antaŭe eta judaro nun povis kuraĝe aliri la fondon de juda centro kun sinagogo kaj kromaj salonoj kaj instalaĵoj.

La dato de la fondado estas simbola. Akurate sepdek jarojn post la detruado de multege da sinagogoj en la hitlera Germanio dum pogroma nokto, tiam moke nomata „imperia kristalnokto”, oni fondis la trian sinagagon en Speyer post la mezepoka kaj post la dua el la dek-naŭa jarcento, en 1938 detruita de la nazioj. Speyer apartenis al la

SCHUM-komunumoj, la plej renomaj judaj komunumoj en la mezepoko, kie elformiĝis la aŝkenazaj rito, teologio kaj vivmaniero. La akronimo SCHUM ligas la urbojn Speyer (SCH – Ŝ), Worms (W – Ŭ) kaj Mainz (M).

Ke nuntempe en Germanio fondiĝas sinagogoj, ne plu estas malofta mirindaĵo. Sed en Speyer la loko de la



La baza ŝtono en la iama tabernakla niĉo.

konstruaĵo estas aparte menciinda. La nova sinagogo ne estas konstruebla sur la tereno de la siatempe detruita sinagogo. Tie, urbocentre, instaligis jam antaŭ multaj jaroj granda vendejo. Anstataŭe oni trovis konvenan lokon en la tereno de la iama katolika monaĥejo Sankta Guido, antaŭ nelonge profanita kaj akirita de la urba komunumo. La sinagogo mem havos sian lokon precize tie, kie oni dum jarcentoj kultis kristane.

Dum la solena metado de la baza ŝtono parolis inter aliaj Kurt Beck, ministro-prezidanto de la federacia lando Rejnlando-Palatinato, Werner Schineller, la urbestro kaj precipa apoganto de la

projekto, Peter Waldmann, la prezidanto de la Landa ligo de judaj komunumoj en Rejnlando-Palatinato, Karl-Heinz Wiesemann, la episkopo de la diocezo Speyer, Eberhard Cherdron, prezidanto de la evangelia eklezio de Palatinato kaj Alfred Jacoby, la arkitekto. Ili ĉiuj emfazis la simolan karakteron de la fondado, de la dato, de la loko. Samtempe ili memorigis la dolorigajn eventojn en 1938 kaj aktualajn kontraŭjudajn agadojn kun la resumo: Neniam ree! Entute ili taksis la refondadon de la juda komunumo kaj la konstruadon de nova sinagogo esperiga momento en la urba kaj regiona historio, signifa religie, politike kaj kulture.

La ceremonion akompanis specife judaj kantoj. Kantoro kantis psalmon antaŭ la baza ŝtono, kiu trovis sian lokon en la niĉo, kie iam tabernakle manifestigis la dia ĉeesto. Granda aro da judoj kaj simpatiantoj estis konsciaj pri la historia signifo de la fondado. Per ĝi mirakle reekfloros la juda vivo en Speyer, antaŭe preskaŭ plene estingita. Laŭ la planoj la nova centro ekfunkcios en 2010, pliriĉigonte per judaj kontribuoj la kulture vivon de la urbo, aktuale pli konata pro la katolika katedralo, tombejo de pluraj germanaj imperiestroj, kaj la protestanta protestado.

Franz-Georg RÖSSLER



Modelo de la sinagogo en la iama altarejo.

Kompreno en kunteksto ...

Materiismo estas, proksimume, la kredo, ke la sola realo estas tiu perceptebla tra la sensoj (ĉu aŭ ne helpe de teknologio). Laŭ tia vidpunkto, la sperto nur subjektiva estas nefidinda ĉar ne eblas kontroli ĝin kontraŭ sendependa normo komune akceptata. Tial por materiistoj malakceptiĝas – ĉar simple subjektivaj – ĉiaj religioj kaj spiritalismo.

tiuj estas pensoj kaj sentoj rilataj al nia „signifeco”, t.e. kiel la homoj rilatas al pli vasta kunteksto: la socio, la mondo, la naturo, la ekzisto, la kosmo, la (fina) realo ...

Laodoro de brulado neniam signifas sen kunteksto: apud festofajro, ĝi estas esenca kaj grava parto de la festa sperto; en domo ĝi povas esti kialo de ekmaltrankvilo; en urba situo, kialo de scivo-

kas, fekas kaj evitas danĝeron, jes jen la tuta vivo. Alivorte, se la sola disponebla kunteksto estus materia-fizika-sensa (kia ĝi plej eble estas por multaj, kvankam kredeble ne ĉiuj, bestoj), do jes, jen ĉio! Tamen la *homo sapiens* kreis kromajn kuntekstojn, mensajn, konceptajn. Ja bonefike, ĉar tiuj kunteksto ebligas al ni fari inteligentajn (t.e. sukcesajn) decidojn pri tio, kion fari, kiam, kun



La mensa vivado estas la ĉefa parto de nia spertado: sonon, vidon, odoron kaj palpon ni interpretas, ne kiel vibrojn ĥemi-fizikajn, sed kiel tutajn spertojn

Tamen, la mensa vivado estas la ĉefa parto de nia spertado: sonon, vidon, odoron kaj palpon ni interpretas, ne kiel vibrojn ĥemi-fizikajn, sed kiel tutajn spertojn, kiujn plej ofte ni povas dividi kun aliaj homoj tra lingvo, arto, poezio, dramo kaj muziko. Inter tiuj travivaĵoj estas spertoj laŭnome „spiritaj”. Homoj uzas tiun vorton „spirita” diversmaniere, sed komuna elemento ŝajne estas, ke

lo, spekulativo. Simile, nombro, kolorkombino, eksono de sonorilo, geometria desegno, sonoj ordigitaj en parolon, kaj tiaj plu – ĉiukaze la signifo dependas de la kunteksto. Por havi signifon, ĉia sperto devas rilati al iu kunteksto. Same je la sperto estadi. Niaj sensoj sciigas nin ke ni estas tie ĉi, vivaj, vekaj, konsciaj, pensantaj, sentantaj. Do? Ĉu jen ĉio? Se ni nur spiras, dormas, manĝas, trin-

kiuj, kiamaniere, kiom ofte, dum kiom da tempo – surbaze de la signifo kaj la implicoj de tio, kion ni faras. Tiel, la tuta kulturo kompreneblas kiel kunkreskaĵo da utilaj kuntekstaj konceptaroj, kiuj donas signifon, signifecon al efektive ĉiuj aspektoj de niaj vivoj. La „kulturo” inkludas, interalie, konceptojn spiritajn, pridiajn, transcendajn, „supernaturajn”, religiajn. Nu, mi proponas ke spiritaj

konceptoj donas kuntekston, tiel signifon, al la sperto „estadi”, konscii, same kiel konceptoj muzikaj, artaj, literaturaj, politikaj, sociologiaj, sciencaj, donas kuntekstojn kaj (esperende) signifojn al niaj spertoj en tiuj sferoj.

Do, provizora difino de „spirita” estus *tiu aspekto de la mensa vivo, kiu koncernas la sperton esti memkonscia homa kaj kiu celas krei rilaton inter tiu sperto kaj pli vasta koncepta kunteksto, en kiu la sperto okazas kaj kompreneblas*. „Spirito”, substantive, estas koncepta kreitaĵo deriva de la rekte spertata „spirita”, samkiel „arto” deriviĝas de la arta, estetika aspekto de la vivosperto.

Same kiel la aliaj grandaj fakoj de la mensa mondo, la spirita havas longan, varian historion. El la malmulta informo havebla, verŝajnas, ke la unua spirita

gamon da kromaj funkcioj – moralajn, disciplinajn, jurajn, sociajn, klerigajn, artajn, administrajn, eĉ foje politikajn kaj militajn – sed tiuj ne estas esencaj de la spirita, ili estas akcidentaj alkreskaĵoj. Do, la religio estas multe pli ol la spirita; ekzistas spirita dimensio en la vivo, ĉu aŭ ne ekzistas organiza religio.

„Dio” estas parto de tiu spirita-historia evoluo. Kiom estis misteroj en la vivo, preter klarigo kaj kompreno, tiom oportunis krei eksteran dimension – *deus ex machina* – por tion klarigi. Komence, tio estis simple mitaj „Fortoj” – tondro, printempo, pluvo, suno, varmo, vento, kaj tiaj plu. Pgrade, tiuj „fortoj” ekhavis personajn kvalitojn kaj iĝis „spiritoj” aŭ dietoj (t.e. „etaj dioj”!). Tra multaj jarmiloj, oni ordigis tiujn diojn laŭ hierarkio, laŭ la graveco por la ho-

specifaj aspektoj de la natura mondo – ĉielo, tero, maro ktp – pliposte tiuj rilatoj iĝis kvazaŭ etiketoj, nur nomoj; la gravaj karakterizaĵoj de la dioj estis la personecoj: kolera, venĝema, kompata, bela, saĝa kaj cetere. Alivorte, la dioj estis – ankoraŭ estas, mi argumentus – personigoj, metaforoj de homaj kvalitoj, kaj pozitivaj kaj negativaj, pri kiuj la respekto, la adoro ŝuldata laŭas la gravecon de tiuj kvalitoj en la homa vivo: milito, fekundo, lojalo, sekuro, sano, gastamo kaj cetere.

Tiel – jen la fino de la fadeneto – jes ekzistas Dio, en la senco, ke ekzistas Amo, Espero, Lojalo, kaj meritas nian subtenon. Via Dio estas kio plej gravas por vi – kaj ne nepre nur unu afero. „La mono estas lia Dio”, ofta diro en multaj lingvoj, signifoplenas ĉar intuicie ni



Fine, ekestis la koncepto de unuopa „Vera Dio”

kreitaĵo de homo („teorio” en plej vasta senco de la vorto) estis en formo de *Mitoj*; fakte, povas esti, ke Mitoj estis la bazo de ĉia nemateria kulturo. El pramitoj, la pensado evoluis en la plej fruajn formojn de religio, kie mitoj ligiĝas kun ritoj, aŭspicie de fakulo pri spiritaĵoj: unue ŝamanoj, poste sacerdotoj en temploj, fine organizaj religioj kaj eklezioj. Survoje, tiuj strukturitaj religioj akiris

maro, de tio, kion ili simbolis. Plej ofte superis la Ĉiel-Dio (pro kio venas el la ĉielo), vice la Ter-Diino (fekundo), Milito, Morto, Maro kaj cetere. Fine, ekestis la koncepto de unuopa „Vera Dio”, plej eble en Mezopotamio ĉirkaŭ 1000 antaŭ Kristo. Tiu unuopa Dio estis ĉiam pli abstrakta, pli fora ol la minoraj dioj, malpli koncernata pri homaraj aferoj.

Kvankam origine tiuj dioj rilatis al

scias, ni komprenas, ke „Dio” estas „tio plej grava, je kio oni kredas”. Dio havas nek personecon nek volon, nek komencon nek finon, nek korpon nek menson; la Diaĵo estas abstrakta kiel la Vero, la Racio, la Virto, tamen pli majora ol ĉiuj tiuj.

Jes, do, mi kredas je Dio – ĉar tion signifas la vorto!

David KESLO

UKRAINIO

Ortodoksaj preĝejoj en la Ĥarkiva regiono



STUCK IN CUSTOMS

Kiam oni promenas en la centro de Ĥarkivo antaŭ la okuloj aperas eble la plej impona konstruaĵo – katedralo de Anunacio

Harkivo estas relative juna ukraina urbo – ĝi estas fondita en 1654. La ĉefa konfeso de ties loĝantoj estas ortodoksa kristanismo. En la urbo kaj ĝia regiono oni konstruis ĝis nun proksimume 900 ortodoksajn preĝejojn kaj monaĥejojn. Multaj el ili estis aŭ plejne detruitaj, aŭ bruligitaj dum la sovetia periodo.

La plej malnova preĝejo troviĝas en urbo Izjum. Ĝi estas konstruita en 1685 kaj poste restaŭrita. En Ĥarkivo mem la plej malnova estas monaĥejo de la Protekto de Dipatrino (1689). Ĝi estis renovigata longan tempon, sed nun funkcias. Sur la tereno de monaĥejo oni starigis tri monumentojn omaĝe al la mil-jariĝo de kristanismo en Rusio-Ukrainio (celebrata en 1988), inter kiuj unu honore al Jesuo Kristo. Kiam oni promenas en la centro de Ĥarkivo antaŭ la okuloj aperas eble la plej impona konstruaĵo – katedralo de Anunciacio. Ĝi impone aspektas ene kaj ekstere. Feliĉe, nek la sovetia reĝimo, nek la periodo de nazia okupado dum la dua mondmilito povis iel malbone influi al ĝi. Nur iam en 1974 fortega vento faligis la grandegan krucon de ĝia tegmento kaj por remeti ĝin necesis certaj klopodoj. Lastatempe oni ĉiam pli beligas la katedralon.

Ni ne povas ne mencii ankaŭ la katedralon de Dipatrina Ĉieliro. Ni jam skribis pri ĝi (MONATO 2004/2). Ĝi estas konstruita en 1780, poste kelkfoje renovigita, kaj nun belaspektas.

Fine ni ŝatus nomi tri pliajn vidindajn preĝejojn en nia urbo, kiuj estas ŝtonaj, restaŭritaj kaj nun funkciantaj: la ĉetombejan (1857), la kirkojn de Petro kaj Paŭlo (1875) kaj de la Dipatrino de Kazano (1912).

Dmitrij Cibulevskij



Preĝejo de Petro kaj Paŭlo.



Monumento omaĝe al la mil-jariĝo de kristanismo en Rusio-Ukrainio.



Monumento honore al Jesuo Kristo.



Katedralo de la Dipatrina Ĉieliro.

ANALOJ DE BAILENAMBEANN


Kronikoj pri la vivo en irlanda urbeto: Proksimaj kaj malproksimaj najbaroj

Sude de Bailenambeann estas montaro nomata Slievenagat, angligita kripligo de la irlanda Sliabh na gCat, „montaro de la katoj”. La nomo ne rilatas al la besteto, kiun PIV ĉarme difinas kiel „mamulo ... tenata kiel muskap-tanta dombesto”, sed al la pinarba mustelo aŭ martesio. La irlandgaela nomo de

estas tre lertaj masonistoj. Kvankam Seán ne plu gajnas sian tagan panon per laboro por la graflanda konsilantaro, li distras sin per farado de diversaj ŝtonaj artaĵoj. Kun helpo de Tadhg, li restaŭris kaj plibeligis la murojn de tradicia sankta puto, nun rigardata kiel kristana objekto, sed kiu verŝajne estas de pagana

Kiam li klarigis, ke li mem faris la kapojn, ŝi estis iomete embarasita. La domo de Seán troviĝas apud rivero, kioj kaj pitoreska ruino de muelejo en bela vilaĝo ĉe la flanko de la montaro. Tiun terenon ĉirkaŭ sia domo li transformis en belegan ĝardenon, admiratan de ĉiu vojaĝanto, kiu trapasas la vilaĝon.

Kvankam li aspektas kiel tipa kamparano, Seán, same kiel multaj el liaj samlandanoj, ne estas simpla needukita manlaboristo. Loĝante en loko, kie de longe la plimulto ĉesis uzi la irlandgaelan kiel ĉiutagan lingvon, li ankoraŭ parolas la idiomon kaj lerte verkas ankaŭ en la angla. Lia plej granda literaturaĵo estas dika ilustrita libro pri la Slievenagat-Montaro, eldonita de la loka historia asocio. Seán estas vaste konata kiel *seanchaí*, kio en la irlanda lingvo signifas homon, kiu konservas kaj rakontas antikvajn legendojn, tradiciojn kaj historion. Li posedas riĉegan kolekton da



CLAUDIO, AR

tiu rabobesto estas *cat-crainn*, laŭvorte „arba kato”. Kompare kun montaro en alpaĵ regionoj, Slievenagat ne estas tre impona; fakte, temas pri vico da montetoj, el kiuj nur kelkaj estas relative altaj. Tamen, ĝi estas bela regiono, kie oni ĉiam povas trovi solecon kaj trankvilon.

La montaranoj estas afablaj kaj gastamaj. Du el la plej interesaj kaj simpataj estas la maljunaj amikoj Seán kaj Tadhg. Ĝis siaj emeritiĝoj, ili ambaŭ laboris kiel ŝtonmasonistoj, metio, kiun ili heredis de siaj respektivaj patroj, loke renomaj pro sia konstruado de preskaŭ ĉiuj el la pontetoj kaj apudvojaj muroj en la regiono. Ankaŭ Seán kaj Tadhg

origino. Por la muroj li gravuris slabon kun surskribo en la irlanda lingvo kaj en la antikva manuskripta alfabeto, kaj ornamis ĝin per skulptita homa kapo. Ankaŭ lia riverborda ĝardeno estas ornamita per tiaj kapoj, imitaĵoj de la antikvegaj antaŭkristanepokaj ŝtonaj kapoj troveblaj en tuta Irlando. Iufoje, mia kara edzino Hortensia vizitis la hejmon de Seán akompanate de amikino, kiu estas arkeologo. La arkeologino estis tre ekscitita, kiam ŝi rigardis la kapojn. Ŝi demandis al Seán, ĉu li jam raportis al la nacia muzeo pri la ekzisto de tiuj gravaj arkeologiaĵoj. Li lakone respondis, ke ne. Ŝi insistis, ke tio estas lia devo.

tiaĵoj – veran etnologian trezoron.

En la sama vilaĝo, Ballyallin, loĝas iom ekscentra anglino, Zoe Drab. (Unu el la signifoj de la angla vorto *drab* estas „malbrila”; alia signifo – kiun ni ne menciis – estas „ĉiesulino”, sed tiuj adjektivoj nek taŭge nek juste priskribas ŝin.) Ŝi vestas sin per stranga miksaĵo de drapoj kaj koloroj, kaj ŝia rufa hararo elstaras kiel sovaĝaj flamoj ĉiuflanke de ŝia kapo. Ŝi okupas la plej grandan kaj plej kadukan domegon en la vilaĝo, kie ŝi naskis siajn (nun plenkreskajn) gefilojn Pandora, Icarus kaj Henry. La patro de la gefiloj ne plu vivas kun Zoe, do sola ŝi devas zorgi pri la domo kaj

la bieno. En ĉi tiu kunteksto „zorgi” ne estas ekzakte la plej trafa verbo, ĉar la interno de la familia hejmo troviĝas en mizere neglektata stato. Iam, kiam ni vizitis ŝin kune kun amiko, tiu demandis, ĉu li povas uzi la necesejon, ŝi respondis, ke la necesejo ne funkcias, sed oni povas uzi la ĝardenon por la sama celo. Laŭinforme la gefiloj de Zoe estis edukitaj en unu el la plej multekostaj lernejoj en Irlando, do almenaŭ iam, al la familio Drab ne mankis mono. En la bieno abunde kreskas ĉiuj specoj de fruktoj kaj legomoj, sed Zoe ne portas siajn rikoltojn al iu ajn bazaro aŭ vendejo, do la troaĵo, kiun ŝi ne povas manĝi, putras aŭ estas fordonata al la najbaroj.

Zoe nomas sin artisto, sed ĉu ŝi iam sukcesas vendi – aŭ eĉ provas vendi siajn artaĵojn – ne estas klare. Ni plurfoje vidis ekspoziciojn ŝiajn en Ballyfarson, la plej proksima merkata urbo. La montraĵoj konsistis parte el abstraktaj pentraĵoj, sed precipe el *collages*, t.e.


noj dum la dek-naŭa jarcento. Eble estus malĝentile sugesti, ke Zoe estas malsukcesa artistino, sed ŝi ankoraŭ ne atingis veran famon. Espereble ŝia baldaŭ venonta ekspozicio furoros. Ŝi informas nin, ke temos pri bildoj pri tradiciaj butikoj.

La ĉeesto de angloj ne ĉiam estis bonvena en Ballyallin. Dum la ribelo kontraŭ la brita regado de Irlando, kelkaj anoj de pacema angla bienista familio apartenanta al malgranda religia sekto estis murditaj de IRA (la tiel nomata irlanda respublikisma armeo). Kiuj supervivis, elmigris al Aŭstralio, kie iliaj posteuloj ankoraŭ vivas. Feliĉe, tiaj grandaj tragedioj ne plu okazas en la montara regiono.

Tamen kelkfoje la montaranoj spertas etajn malĝojojn. Du generacioj de la vilaĝa familio Murphy estis posedantoj de la loka trinkejo, „Riverborda Taverno”. Laŭ tradicio irlandaj familioj, kiuj havas plurajn gefilojn, dediĉas unu filon

preĝejo, sed tion la episkopo ne permesas. La vilaĝanoj, kiuj estas tre toleremaj, volonte akceptus lin kiel sian pastron (eĉ edziĝinta), sed nenio estas farebla. Laŭraporte, P.J., lia edzino kaj ilia kreskanta familio baldaŭ reiros al Aŭstralio, kaj la vilaĝanoj perdos unu el siaj plej ŝatataj filoj. Tia estas la vivo en la Lando de Sanktuloj kaj Doktuloj.

Johano estas mezaĝa profesia fotisto, kiu loĝas en la norda kvartalo de Bailenambeann. Lia ŝatokupo konsistas el longaj piedvagadoj en la montara regiono, kiun li tre bone konas, kaj pri kiu li faris belan ilustritan mapon. Ekde sia infaneco li estis tre sinĝena kaj soleca homo, sed lastatempe li iĝis multe pli aplomba kaj kontenta. La kaŭzo estas, ke li finfine sukcesis trovi virinon, kun kiu li povas rilati. Fatima – tiel ŝi nomiĝas – estas filino de irlanda patrino kaj (supozeble) indonezia patro. La patro malaperis, kiam ŝi estis bebo, kaj ŝi, kiel ankaŭ Johano, havis malfeliĉan in-



glubildoj, faritaj el amorfaj kunmetaĵoj de rubaĵo. Ili aspektis nek puraj nek allogaj, sed por motivoj de najbareco kaj solidareco ni akceptis la inviton ĉeesti la ekspoziciojn, ĉar kulturaj eventoj estas maloftaj en Bailenambeann. Iu alia ekspozicio de Zoe, kiun vizitis nek ni, nek iu alia membro de la publiko (do ĝi estis tute fiaska) konsistis el kolekto da bildoj kaj informtabuloj pri tradiciaj kitletoj portitaj de sud-anglaj kamparanoj dum la dek-naŭa jarcento. Estas evidente (almenaŭ laŭ nia limigita sperto), ke neniu en Irlando interesiĝas pri tradiciaj kitletoj portitaj de sud-anglaj kampara-

(kaj unu filinon, se estas pli ol unu) al la katolika eklezio. P.J., la plej aĝa el la gefiloj Murphy, estis ordinita kiel pastro kaj sendita de sia ordeno al paroĥo en Aŭstralio. Tie li iom maldiskrete ekamis kaj edziĝis kun aŭstralianino, do ne plu havis permeson funkcii kiel pastro. La gepatroj de la aŭstralia virino, kiuj estis tre piaj, ne akceptis la bofilon. Kune kun sia nova edzino, P.J. revenis al sia hejmvilaĝo en Irlando, kie li anstataŭis sian maljunan patron kiel proprieto de la trinkejo. Aktuale Ballyallin ne havas sian propran pastron, kaj P.J. tre ŝatus povi celebri la meson en la vilaĝa

fanecon. Ĉar ŝi ne havas eŭropan aspekton, ŝi ofte suferis diskriminacion. Antaŭ nelonge ili geedziĝis – ne en preĝejo, sed en la civila registrejo, aranĝo, kiu relative malofte okazas en ĉi tiu precipe katolika lando. Johano sentis, ke edziĝa ceremonio en nura oficejo ne estas sufiĉe romantika kaj solena, do, post la edziĝfestoj, li invitis siajn konatojn al neoficiala bona ceremonio ĉe la sankta puto apud Ballyallin. La invitkarto informis, ke la evento konsistos (konforme al honorata kelta tradicio) el „beno kaj posta diboĉo”. P.J. konsentis doni la benon al la paro. Johano luis minibuson

por transporti la konatojn al la puto. La bona ceremonio estis ĝoja afero, kvankam la suno ne ridetis sur ĝi. Fatima alvenis, refoje surhavante sian rozkoloran satenan nuptorobon. P.J., kiu por la okazo portis siajn ne plu ofte uzatajn mesvestojn, legis la edziĝliturgion kaj preĝojn, du amikoj legis poemojn, kaj la tuta evento ŝajnis (almenaŭ al Hortensio kaj mi) feliĉa kombinaĵo de kristanaj kaj paganaj tradicioj. Ni ĉiuj buse revenis al la vilaĝo, kie P.J. revestis sin per sia ĉiutaga vestaĵo kaj ree alprenis sian normalan trinkejstran rolon, kaj ni drinkis kaj trinkis, tostis la novajn geedzojn, kaj dancis ĝis noktomezo.

Norde de la rivero en Bailenambeann estas miksita kvartalo de socialaj domaroj de laboristoj kaj senlaboruloj, kune kun luksaj domoj de bonstataj civitanoj. Tie troviĝas ankaŭ la stadiono de la Gaela Atleta Asocio kaj la graflanda malsanulejo. Du virinoj, kiuj loĝas en la norda kvartalo kaj apartenas al nia rondo

dikiĝon kaj por beligi la inan korpon, kaj samtempe spektaklo, kiu tre allogas la virojn. Aoife laboras en malsanuleja laboratorio, sed ŝi pli interesiĝas pri arto kaj muziko. En sia libertempo ŝi organizas artajn kaj muzikajn eventojn en la urbo. Kvankam ne plu tre junaj, ambaŭ virinoj estas beletaj, amuzaj kaj simpatiaj. Ambaŭ estis antaŭe edziniĝintaj, sed la edzoj estis drinkemaj kaj brutalaj viroj, kiuj konstante bategis ilin. Prudente, ili disiĝis de la edzoj kaj nun havas pli pacan kaj feliĉan vivon. Por ni ĉiam estas granda plezuro renkontiĝi kun tiuj du afablaj amikinoj. Ni malfacile povas kompreni, kial tiuj afablaj kaj ege inteligentaj virinoj elektis tiom maltaŭgajn edzojn.

Du gravaj civitanoj de Bailenambeann estas Paul M. kaj Liam B. Ambaŭ estas instruistoj pri muziko: la unua menciita, pri piano; la dua, pri trumpeto. Plie, Paul estas orgenisto en la katolika paroĥa preĝejo, kaj estas tre ĵaluza pri sia

okazoj por aŭskulti klasikan muzikon estas maloftaj, oni devas esti dankema, ke almenaŭ iu klopodas levi la kulturen nivelon en Bailenambeann. Liam estas direktoro de blovorkestro formata el la plej bonaj anoj de sia lernantaro. Li estas tre malgranda homo – eĉ pli malgranda ol Paul, kies staturo estas iom malpli ol la averaĝa irlanda viro, sed li konfirmas sian viran dignon per impona barbo kaj forta personeco. Liam kaj Paul (kiel multaj muzikistoj) ege malamas unu la alian. Ili ofte kverelas pri muzika interpretado, kiam ili kune partoprenas en publika ceremonio, koncerto aŭ kantata meso. Iam, en la preĝejo okazis grava miskompreno. Paul ludis longan orgenan komponaĵon, dum kiu Liam devus ludi fanfaron. Subite Paul interrompis, plendante, ke Liam blovis malĝustan noton. Liam indigne protestis kontraŭ tiu akuzo. Paul leviĝis, kaj oni ricevis la impreson, ke li intencas bati la trumpetiston. La kongregacio tiam spektis ter-



KARSTENKNEESE

de konatoj, estas Orla kaj Aoife. Orla laboras en urba oficejo, sed semajnfine ŝi agas kiel arbitraciantino ĉe la matĉoj de la *Camogie* – (Virina Atleta) Asocio. Ŝi estas tre kapabla virino. Krom ŝia sporta aktiveco, ŝia dua – ne tipe ina – ŝatokupo estas ĉarpentado, kaj ŝi lerte faris sian propran doman meblaron. Ŝiaj gefiloj estas ĉarmaj kaj bonkoraj junuloj, kiuj laboras por bonfaraj organizaĵoj. Ŝia bela filino Patricia estas helpantino en centro por aŭtismoj. Ŝia hobbio estas ekzota ventrodancado, kiu tre furoras inter junaj virinoj en nia urbo. Laŭŝajne tiu speco de dancado estas rigardata kiel sana ekzercado, efika rimedo por eviti

grandioza orgeno, unu el la plej grandaj kaj famaj en la lando. En sia malabunda libertempo, li estas direktoro de la urba ĥoro *Schola Cantorum*. Kelkaj el la viroj en la ĥoro iam havis bonajn voĉojn, sed ili ne plu estas junaj. La virinaj membroj estas eĉ pli maljunaj, kaj oni ne povas kredi, ke ili iam ajn bone kantis. Do, kvankam Paul estas bona muzikisto, al li mankas bona materialo por krei belan koruson. Aŭskultantoj ĉe la koncerto de la ĥoro devas suferi du horojn da malagrabla sono. Estus malĝentile kaj eble malvere aserti, ke ĝi similas la kantadon de viratoj sur la tegmento de nia domo, sed dolĉa ĝi certe ne estas. Tamen, ĉar

uran scenon, en kiu la orgenisto preskaŭ ĵetis sian kolegon malsupren laŭ la kruta ŝtuparo de la orgengalerio. Eĉ inter duonebriaj tradiciaj muzikistoj en irlandaj trinkejoj, tiaj bedaŭrindaj bataloj estas maloftaj. Feliĉe, Liam bone kapablas defendi sin, malgraŭ sia malalta – fakte preskaŭ nana staturo. Li estas inda posteulo de la fama kelta heroo Cu Chulain, kiu defendis sin per batilo kaj pilko kontraŭ la feroĉa hundo de Ulstero.

Alia interesa loĝanto de Bailenambeann estas William, la frato de la konatisto Albert Bell. Kiel iliaj nomoj sugestas, ili apartenas al protestanta familio de angloirlanda deveno. Albert estas

sobra kaj respektinda ano de la socio, sed la vivstilo de William estas malpli ŝablona. Kvankam pli ol kvardekjaraĝa, li vestas sin kiel junulo, per lana ĉapo, T-ĉemizo, sakforma pantalone kaj kanvasaj sportŝuoj. Ĉiutage li manĝas en rapidmanĝejo, ŝatata de dekelkjaruloj, kie li nutras sin per hamburgeroj kaj kokakolao. Laŭraporte li estas teknikisto, kiu iam laboris eksterlande, sed nun li pasigas preskaŭ ĉiun tagon de la semajno malrapide promenante tra la stratoj, salutante kaj rigardante neniun. Iam li aperigis memeldonitan libron, kiun li verkis dum periodo de kelkaj jaroj. Ĝia titolo estis *Praktika gvidilo por efika uzado de la menso*, kaj li prezentis ĝin al la publiko per librolanĉo en luksa hotelo. Oni devis pagi por ĉeesti la eventon, sed la enirpago donis rajton al glaso da acida vino kaj eta porcio de fromaĝo, kaj William insistis, ke ĉiu ĉeestanto aĉetu sufiĉe multekostan ekzempleron de la libro. Ni supraj rigardis la verkon kaj konstatis, ke ĝi estas nek praktika nek utila. La unuaj paĝoj precipe konsistas el listo de la terminaro uzota en la teksto, sed poste la aŭtoro uzas nur mallongigojn: ekzemple, EUM signifas „efika uzado de la menso”, NEUM, „neefika uzado de la menso”, ktp. Pro tio, la suferanta leganto devas trovi la vojon tra labirinto de akronimoj: EUM, NEUM, FTK, LNE, PRDL, ktp, kaj finfine rezignas pri la tasko kaj perdas la deziron plu vivi. Se oni iom persistas en la legado, oni konstatas, ke la verko estas nekomprenebla kaj nelegebla. Al unu el la malmultaj homoj, kun kiu William konsentas konversacii, li menciis, ke li inventis kaj patentigis maŝinon por kuraci kalvecon, sed ĉu la maŝino iam estis konstruita, kaj ĉu ĝi vere kuracas kalvecon, neniuj scias.

Gravaj krimoj ne estas oftaj en Bailenambeann. Tommy Nolan estas malgranda deliktulo, kies pli persista misfaro estas troa drinkado. Preskaŭ ĉiun semajnfino li ebriiĝas, kaj tiam lia normale pacema karaktero transformiĝas. Lastafoje li tiom freneziĝis, ke li frakasis preskaŭ ĉiujn fenestrojn en Preĝeja Strato. Li estis arestita kaj devis aperi en

la urba kortumo antaŭ juĝisto, kiu kondamnis lin al unu monato da mallibero. Tio ne estis lia unua apero en la kortumo, sed ja lia unua restado en malliberejo. La sperto tute ne plaĉis al Tommy – fakte, li tiom suferis de depresio, ke post unu tago li provis pendumi sin en la karcero. Kiam li estis enkarcerigita, la provosoj forprenis de li liajn ŝulaĉojn, poŝtranĉilon, kaj la zonon de lia pantalone, por eviti, ke li damaĝu sin. Tamen, ili ne sciis, ke Tommy, kiu estas pesimisma viro kaj ĉiam anticipas katastrofon, kutime uzas kaj zonon kaj ŝelkon. La provosoj ne rimarkis la ŝelkon, do ne devigis lin forigi ĝin. Ĉar li ne havis alian rimedon, Tommy provis pendumi sin per sia ŝelko. Sed la ŝelko, kompreneble, estis elasta, do li ne sukcesis strangoli sin. Li nur resaltis kiel „bungo” – saltanto dum kvarono de horo, ĝis alveno de provoso, kiu malligis lin. Ekde tiam, Tommy ne tiom ofte ebriiĝas.

En la jaroj tuj post la aliĝo al Eŭropa Unio, Irlando, kiu dum jarcentoj estis malriĉa lando, el kiu la plimulto elmiĝadis, spertis prosperan konjunkturon. Lastatempe, kiel en pluraj aliaj EUMembroŝtatoj, ĝi iĝis celo de amasa enmigrado, precipe el orienta Eŭropo, sed ankaŭ el Brazilo kaj Afriko. En Bailenambeann, la plimulto de tiaj novaj loĝantoj devenas el Pollando. Ties influo estas sentebla en ĉiu aspekto de la socia vivo. Nun en la urbo estas polaj vendejoj; polaj specialaĵoj estas vendataj en la superbazaroj; librovendejoj stokas librojn en la pola; kaj en la urba biblioteko estas pollingva sekcio. La graflanda plenkreskula instruinstanco organizas vesperkursojn por irlandanoj pri la pola lingvo. Ili okazas en la teknika lernejo, kie oni povas studi ankaŭ aliajn lernobjektojn: komputado, franca, irlandgaela, ktp.

La irlandaj buĉejoj kaj viandfabrikoj dungis enmigrintojn el Brazilo, ĉar malmultaj irlandanoj nun pretas labori inter la sango kaj ekskremento de tiaj lokoj. La brazilanoj precipe devenas el ege malriĉaj regionoj de sia hejmlando, kaj la plimulto estas needukita kaj parolas nur la portugalan. Grupo da ili aliĝis al kurso en la teknika lernejo pri la angla

lingvo, supozeble por povi trovi pli bonajn postenojn kaj por faciligi sian vivon en fremda lando. Bedaŭrinde la pordisto de la lernejo mise indikis la numerojn de la respektivaj klasĉambroj, kaj la brazilanoj erare troviĝis en la ĉambro, kie estis instruata la irlanda lingvo. Ili ĉiusemajne ĉeestis tiun kurson, kie, kompreneble, ili lernis nenion pri la angla. Post iom da tempo, la pordisto decidis ŝanĝi la numerojn de la klasĉambroj, kaj la irlandlingva ĉambro iĝis la pollingva. Pro tio, la brazilanoj nun trovis sin en la kurso pri la pola. Do, dum iom da tempo loĝis en Bailenambeann grupo da personoj, kiuj provis kompreni sin per miksaĵo de irlandaj kaj polaj frazoj, supozante, ke ili parolas la anglan. Feliĉe, nelonge poste, ili konstatis, ke ili estis viktimoj de fuŝaĵo, kaj, ĉar ili estas nature intelligentaj homoj, ili sukcesis lerni sufiĉe bone la deziratan lingvon harmonie kun la nacia devizo de Brazilo: *Ordem e progresso* (ordo kaj progreso). Fino bona, ĉio bona ...

Albisturo KVINKÉ

INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCŖ
KONDOROS, HUNGARIO, 18-24jul09

HUMURA LITERATURO EN ESPERANTO



Informoj, aliĝoj

Eric LAUBACHER, 1 rue Bougainville,
(FR) 78180 MONTIGNY-Bx, Francio
tel. +33 1 30 96 67 91 rete: kasisto@osiek.org

Pál KOZSUCH, Vasút u. 3,
(HU) 5553 KONDOROS, Hungario
rete: pauljuno@freemail.hu
OSIEK: <http://osiek.org>

Jen vere granda vortaro

Jen vere „granda” vortaro, kiu senhezite meritas tiun epiteton! Kaj tiu juĝo estas eldirita de skeptikulo. Kiam mi, antaŭ unu jaro, aŭdis pri nova ĉina vortaro mia reago estis: Kial? Ili jam posedas la plej vastajn kaj bonajn esperantajn vortarojn, en ambaŭ direktoj. Ĉu iu ĉino obstine fermis la okulojn kaj deziras alporti novan lumon? Eĉ kiam mi legis la korelverŝojn de la aŭtoro, kiujn iu amiko sendis al mi, mi restis dubema. Tiuj tekstoj, rakontoj pri la estiĝo de la nova vortaro (vidu, kaj legu: *Sub Peza Ŝarĝo, Tintil' Kamela Sonadas Tutan Vojon!* en pluraj lokoj en la reto) almenaŭ montris al mi, ke la aŭtoro perfekte majstras pri la lingvo kaj stilo. Sed kiam mi vere havis ekzempleron de la libreto en la manoj kaj iom trafolumis ĝin, mi ne plu zorgis pri pasintjara neĝo. Mi nun zorgis pri sekvontjara neĝo! Kiel klarigi al la samideanaro senscia pri la ĉina lingvo, la eksterordinarecon de la nova vortaro? Mi klopodos, kaj ĉar mi estas okcidentano mi ne suferos tro pezan modestecon. La orienta etiketo ja ne permesus sufiĉan fanfaronadon, sed mi estas eksterulo (eĉ mia edzino, japana, ne povos bremsi min). Sed mi devos klopodi sukcesi transdoni mian entuziasmon en maniero komprenebla ankaŭ por nesinologoj. La sinologoj pardonu al mi, ke mi de tempo al tempo klarigos detalojn, kiuj al ili estas memkompreneblaj.

Mi do tuj mem proponis, ke mi recenzu. Ne por havigi al mi senpagan ekzempleron de relative kosta libro, ĉar mi lasos ĝin en la biblioteko de Flandra Esperanto-Ligo, sed precipe por klopodi kontraŭbatali la ankaŭ en Esperantujo regantan diskriminacion de la minoritatoj. Ĉinoj minoritato? Pro multaj, tre multaj, kialoj jes! Ĉiu el ni ja estas iel viktimo de



sia kulturo, kaj okcidentanoj ne liberiĝas de siaj dorsosakoj plenaj de (antaŭ)juĝoj kaj scioj pri sia (angla, germana, franca ... ankaŭ ĉe ne tianacianoj!) kulturo, kaj ne hontas pro sia nescio pri aliaj kulturoj. Jes, vole-nevole, ankaŭ esperantistoj portas tiajn dorsosakojn. Anstataŭ serĉi kaj nombri la komposterarojn (maloftajn) mi klopodos ĉiĉeroni vin, inkluzive la nesinologon, tra la verkego.

Lokigo

Ne, mi ne eraris pri *k* kaj *g*. Mi deziras situigi la libron inter la monda libraro. En Esperanto ĝi nekompareble elstaras! Ĝis nun ne aperis nacilingva-esperanta vortaro, kiu eĉ nur trionon de tiu ĉi ĉina ampleksas. Oni ne tuj rimarkas tion, ĉar finfine temas pri nur ĉirkaŭ 1250 paĝoj. Sed la formato jam estas (se vi deziras, ĉar ekzistas ankaŭ eldono duonformata) pli granda ol tiu de PIV, kaj la teksto estas presita en literoj du kaj

duone ciceropunktaj, mi supozas (alteco de litero proksimume 1 mm). Tamen la teksto (eĉ la malgrandigita je duono) restas legebla. La ĉinaj signoj havas la grandecon de la majuskloj, do la duoblon. Kaj... se necese... valoras la penon aĉeti lupeon (aŭ mikroskopon por la duonformata).

Sinologoj kutime uzas nacilingvan vortaron el serio de samenhavaj libroj eldonitaj de la Ĉina Fremdlingva Eldonejo, ĉe ni plej ofte la anglan version de Wu Jing-rong. Nu, nia dika Wang estas minimume duone pli vasta ol la dika Wu: enhavas pli da vortoj, precipe enhavas pli da ekzemploj kaj esprimoj, kaj pli abunde klarigas gravajn kulturaĵojn. Mi supozas eĉ ke nia vortaro estas nun la plej ampleksa ĉina-fremdlingva vortaro. Vi nepre sciigu tion al neesperantistaj sinologoj!

Logiko

Nia amika moŝto Wang cetere havas tre sanan cerbon! Sciu ke la vortaro estas alfabeto, laŭ la nun kutima pinjino. Ĉinaj ideografaj unuopaj ofte havas signifon, kaj fojfoje memstare funkcias en frazo, sed plej ofte tio, kion ni nomus vorto, konsistas el du sinsekvaj ideografaj. Tiel do ekzistas multaj serioj da vortoj, kiuj havas la saman komencan ideografon. Kutime, kaj tio estas bona afero, ĉar tiuj vortoj tamen plejparte havas parencon signifon, oni lasas ĉiujn vortojn kun sama komencanta ideografajo kune en unu grupo: la vortaro do ne estas strikte alfabeto.

Ekzistas relative multe da ideografaj, kiuj neniam estas uzataj solecaj kaj ankaŭ ne kiel komenca en duopo. En la kutimaj vortaroj tiuj ideografaj tamen okupas apartan artikolon. Nia amiko, tute logike, for-

igis tiujn artikolojn, kaj aperigis nur la ideografaĵojn en la duopoj. Tiel li ŝparas spacon, kiu en aliaj vortaroj estas tute senutila. Neniu problemo por ekkoni la prononcon, ĉar en ĉiu artikolo la prononco estas indikita en pinjino, kaj la ideografaĵo aperas kie ĝi devas aperi, kun plena prononco de la duopo.

Ludu ĉinvortare anstataŭ sudoke!

Mi montros kiel vi povos trovi la vorton, kaj precipe estos interese se vi povos apudmeti alilingvan ekzempleron el la serio de vortaroj ĉinaj. Do, sekvu la gvidanton!

En paĝo 410 A troviĝas 交杯酒 kun la prononco jiao'bei'jiu³ kaj kun la traduko: trinki nuptan pokalon. Vi, tre verŝajne, ne trovos la esprimon (vorton?) en alilingva vortaro (Nu ja, povus esti ke ĝi poste estas aldonita, ĉar mi ne uzas la plej novajn eldonojn). Sed, feliĉe, la aŭtoro ne lasas nin duonsate, sed klarigas la kulturan fonon: parto de malnovmoda geedziĝa ceremonio, en kiu la novedzo kaj la novedzino trinkas el pokaloj kunligitaj per ruĝa fadeno, poste interŝanĝas la pokalojn kaj denove trinkas. Se vi amuziĝus per serĉado de la apartaj ideografaĵoj, kio estas tre facile farebla, kaj kiu instruos al vi praktikan uzadon de la libro, vi trovos: 1: interŝanĝi (unu el al signifoj de unua ideografaĵo); 2: pokalo (unu signifo); 3: alkoholaĵo (unu signifo). La „nupto” ne estas, sed se vi kontrolos ĉiujn eblajn (11) signifojn de la unua ideografaĵo ne prete bruliĝos kandelino en via kapo.

En la apuda paĝo mi trovis 交融 jiao'rong²: miksiĝi, kio ankaŭ estas trovebla en la alilingvaj versioj, sed aldoniĝis tre interesa aldono: (pp literatura verko) 情景交融 qing²jing³ jiao'rong², esprimo, la unuaj du ideografaĵoj do ne havas prononcon indikita, kiu signifas: la kunfandiĝo de la sentoj (de la aŭtoro) kun la fono de la naturo.

Kvartetoj

Tio kondukas nin, pli-malpli, al la

„ĉinaj kvartetoj”, koŝmaroj de sinologoj, fakte respondaĵoj de niaj „esprimoj”. En la ĉina lingvo ekzistas amaso da kvartetoj de ideografaĵoj, kiuj treege koncize (en la kutima orienta maniero: oni eldiras nur la kernon de la ideo ... kaj ni, stultaj okcidentanoj, ne havas sufiĉe da inteligento por logike kompletigi!) esprimas ideon. Mi kontentigos vian scivolon.

Tre konata estas: 猫哭老鼠 (562 A) mao¹ ku¹ lao³shu³ ... kio signifas, ideografaĵo unu post alia: kato plori maljuna rato/muso. La „maljuna” tre ofte estas uzata kiel honoriga prefikso, kiel vi scias el la malnovaj nacilingvaj tradukoj el la ĉina. Estas la maljuna/old de Old Shatterhand! Ĝi signifas ankaŭ morti, laŭ ĉiuj vortaroj, sed tamen ĉinoj ne sentas en tiu ĉi frazo tiun signifon. La esprimo estas tre taŭge tradukita en Esperanto: verŝi krokodilajn larmojn. La senco de la ĉina ja estas: la kato ŝajnigas plori pro mortinta (amiko) muso. Kaj tiel abundas la ĉinaj esprimoj, plej ofte kun bonega (zamenhofa) ekvivalento.

外柔内刚 wairou-neigang (898 A) mola ekstere sed malmola interne – ekstere milda (cedema) sed interne malmilda (firma) – fera mano en velura ganto (z)

非驴非马 fei'lü²-fei'ma³ (242 A) nek azeno, nek ĉevalo; nek viando, nek fiŝo; nek lakto, nek selakto; nek io, nek alio.

杯弓蛇影 bei'gong¹ she²ying³ (33 A) preni por serpento la reflekon de pafarko pendanta sur la muro en la vintaso – ekhavi senkaŭzan timon; esti kaptita de imaga timo; timi sian propran ombbron (z); esti treege suspektema. - Se la du ĵus menciitaj estas facile kompreneblaj el la konsistigaj ideografaĵoj, ne estas tiel por tiu ĉi (almenaŭ ne por mi, sed ...). Unu ideografaĵo post alia: taso, pafarko, serpento, ombro (reflekto). La teksto estus pli klare se „en la vintaso” estus post reflekto(n).

交头接耳 jiao'tou²-jie'er³ (411 B) flustri unu al la alia en la orelon; oreli-se interbabili. Tiun ĉi lastan esperantan

esprimon mi neniam legis aŭ aŭdis; mi supozas, ke estas trovitaĵo de S-ro Wang Chongfang, sed tre plaĉas al mi.

Tre ofte la aŭtoro citas la taŭgan esperantan esprimon, sed, kompreneble, ne ĉiam. Ĉe 明日黄花 ming²ri⁴ huang²hua¹ (584 B) krizantemo post la Festo de Duobla Naŭo, kun tre longa klarigo, pri kiu mi bedaŭras, ke mankas loko por kopii ĝin, mankas „figoj post Pasko” kaj „mustardo post la manĝo” aŭ „putplenigo post drono de bovido”, sed la mustardo post la manĝo tamen aperas en alia loko, ankaŭ taŭga cetere, ĉe esprimo pri ĉina ŝako. Cetere, tamen estas malgranda malsameco, ĉar la ĉina esprimo akcentas la malfreŝecon, jam ne aktualecon (*pri tio jam parolas ĉiuj paseroj*).

Ne ignoru!

Mi esperas, ke la esperantistoj fojfoje praktiku sian ideon pri samvalor-eco de kulturoj, kaj ke ili amase (precipe la grupoj kaj asocioj) aĉetu tiun ĉi majstroverkon. Ĝi estas aĉetebla en diversaj formoj, eĉ en bone bindita formo. Ĝi estas prestiĝa kaj montrinda al la ekstera mondo. Ne necesas, ke vi estu sinologo; ankaŭ puzzlemluloj povos trovi multe da ĝuo kaj ĝojon en ĝi, kaj ili multe pli evoluigos sian intelekton kaj konon per tia puzzlemlado ol per kolektado de poŝtmarkoj!

Manko

Sinologoj, sed ankaŭ aliaj puzzlemluloj, bedaŭros ke ne enestas iu listo por retrovi nekonatan ideografaĵon (do, kies prononcon oni ne konas), sed almenaŭ ĉiu sinologo disponas pri kromvojo(j).

Petro DESMET'

Wang Chongfang: 王崇芳 – Granda Vortaro Ĉina-Esperanta. Eld. Ĉina Esperanto-Eldonejo, 2007. 1248 paĝoj. ISBN 978-988-97558-1-2.


Prezo ĉe Flandra Esperanto-Ligo: inter 29 kaj 75 eŭroj + afranko, depende de la formo kaj formato.

Bilda enigmo

Jen enigmo ĉi-foje kun bildaj priskriboj (solvo povas ankaŭ esti radikvorto). La ŝerĉendan vorton vi trovas en la grizaj ĉeloj.

Sendu la solvon antaŭ la 1a de junio 2009 al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete al enigmoj@monato.net. La 3 gajnantoj ricevos valoran librodonacon.

Atentu! En la marta sudoko estis komposteraro. En la malsupra kvadrato maldekstra devus stari O anstataŭ S.
Kun pardonpeto de via redaktoro !



anoncetoj

La Verda Stelo, <http://tetrapentos.over-blog.com/> enhavas 3 partojn: 1) Tetrapentos, 2) Stelo, 3) La Ora Stelo. La tria parto estas tradukita al pluraj lingvoj; mi emus doni pli da tradukoj al tiu parto. Se tio interesas vin, iru al <http://tetrapentos.over-blog.com/article-16071723.html>

Se vi tradukos tiun paĝon al via naci-lingvo kaj sendos tiun tradukon al mi, mi pagos vin sendante al vi unu ekzempleron de La Ora Stelo (aŭ Verda Stelo, se vi elektas la ludon, kiu enhavas ĉiujn pecojn verdajn). Antaŭ ol komenci tradukon, bonvolu skribi al jacques.ferroul@laposte.net por scii, ĉu neniuj jam komencis traduki.

Vizitu IperNity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 1700 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Jak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto



Ĉu vi jam legis?



Plej furoris en 2008

1. Ziko van Dijk: La Asocio
2. Wendy Heller: Lidia
3. Stephan Lang: La talpočasisto
4. La Jaro 2009
5. Anna Löwenstein: La ŝtona urbo
6. Edwin de Kock: Sub fremdaj ĉieloj
7. Katalin Kovacs: Poŝamiko
8. Petro De Smedt: Zakwoordenboekje/
Poŝvortareto Esperanto-Nederlands-Esperanto
9. Lena Karpunina: Neokazinta amo
10. Ziko van Dijk: Informado praktike
11. Stefan MacGill: Nemave edifi
12. Ludoviko Zamenhof: Fundamento
de Esperanto (hungara)
13. Alberto Fernandez: Kalejdoskopla rememoro
14. Carlo Collodi: La aventuroj de Pinokjo
15. Wandel/Galadi: La kosmo kaj ni (2a eldono)
16. Sen Rodin: Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj
rakontoj
17. Ilustrita oficiala radikaro
18. Petro De Smedt: Nederlands Esperanto
Nederlands
19. Marcus Sikosek: Esperanto sen mitoj
20. Hergé: Tinĉjo en Tibeto
21. Anna Löwenstein: Morto de artisto
22. Hergé: La Nigra insulo
23. Sagao de Njal
24. Sten Johansson: Krimo de Katrina
25. Andrzej Pettyn: Humuro laŭ la skota
maniero

La jenaj 25 verkoj en la Butiko de Flandra Esperanto-Ligo plej furoris en 2008.

Pliajn informojn kaj mendilon vi trovos en www.retbuto.net, sed vi povas kompreneble skribi ankaŭ per la „klasika poŝto” al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.